

LA VERDA LUPEO



31(110) INFORMILO DE ELF - AREK SEPT. 97

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im VdPhA

Unuataga datstampo Haikou, insulo Hainan (El la plumo de Zhang Linrui)



NI PRI NI

Karaj ge-kolektantoj!

Hazarde, trafoliumante malnovajn numerojn de "FENIKSO - VERDA LUPEO", mi konstatis, ke nia nuna redaktoro: Rudi Burmeister transprenis la redaktadon de LVL ĝuste antaŭ 20 jaroj. Ni kore gratulas kaj deziras ĉion bonan por la estonta laboro.

EKSPOZICIOJ KAJ NI

Dum la unuaj 5 monatoj de 1997 tiu ekspo estis videbla en la halo de la Xiqu-a PM-kompanio meze en Pekino memore al la 100-a naskiĝtago de samideano HUJUCZ La ekspo estis aranĝita de la Pekina Esperanto-Ligo, Ĉina Esperanto-Ligo, PMK Xiqu kaj la E-Asocio de Ĉina Akademio de Sciencoj.

La ekspozicio montris: *Filatelaĵojn* kaj *Esperantaĵojn* pri:

- la vivo de s-ano HUJUCZ -
- famaj ĉinaj intelektulaj esperanti:toj
- famaj ĉinaj intelektulaj subtenantoj de Esperanto

Pri la ekspozicio raportis la *"Ĉina Filatela Ĵurnalo"* kaj aliaj gazetoj.

Qin Kaiji

HISTORIO

Poŝkatalogo de glumarkoj kaj TAK-Jarlibro

En la *"Germana Esperantisto"*, marto 1935, troviĝas jenaj anoncoj:

JARLIBRO de TUTMONDA ASOCIO KOLEKTANTA (TAK) por la jaro 1934. Kompilis ĝin *d-ro TAKACS*. Havebla ĉe la kompilinto d-ro Takacs en Nagymaros (H) kaj ĉe s-ro Mizera en Jablonnne (CS).

POŜKATALOGO de la *ESPERANTAJ GLUMARKOJ*. Kompilis ĝin d-ro TAKACS. Haveblas ĉe la kompilinto.

Pri la lasta mi jam aŭdis kaj legis, sed neniam mi vidis tiujn materialojn. Kiu ankoraŭ posedas ilin?

La Esperanto-Kolektanto, n-ro 2 el la jaro 1922.
Tiu gazeto troviĝas en la *Laborista Instituto* en Dortmund (D). Ankaŭ ĝin mi neniam vidis kaj ankaŭ ne scias, ĉu ekzistas pliaj eldonoj.

ATENTIGO DE LA KATALOG-ELDONANTO

Lastatempe aperis pliaj glumarkoj, kiuj estis presitaj je privata iniciativo. Parte ili estis eldonitaj okaze de diversaj aranĝoj. Por diferencigi ilin, mi signos tiujn glm je la fino de la katalogaj indikoj per: PrEl. Tiuj glm ja ne estis eldonitaj de la organizaj komitatoj. Mi afable petas, ke la eldonantoj sendu ankaŭ al mi ekzempleron (folion?)de tiuj glm por la LVL kaj por la katalogo.

La sama peto ankaŭ validas por la diversaj postpresoj de glm el antaŭaj jaroj. Ilin mi ne katalogos, sed mi iamaniere atentigu en la katalogo pri ili.

STAMPOJ

ĈINIO

1996

NET



LVL 40 - KN-NET 272



LVL 41 - KN-NET 273



LVL 42 - KN-NET 274



LVL 43 - KN-NET 275



LVL 44 - KN-NET 276

1997

NET



LVL 01 - KN-NET 277



LVL 02 - KN-NET 278



LVL 03 - KN-NET 279



LVL 04 - KN-NET 280

STAMPOJ

ĈINIO

NOVAJ UNUATAGAJ STAMPOJ EL LA MANOJ DE ZHANG LINRUI

Koran dankon mi direktas al nia Zhang Linrui pro la senditaj kopioj de la novaj stampoj, kiujn li spite al la nunaj altaj poŝtaj tarifoj en Ĉinio, sendis al mi. Sube mi listigas la novaĵojn kaj atentigas, ke ili supozeble haveblas ĉe nia stampobanko (Werner Heimlich).

1996-40-NET-272	Okt.07	Jarkunveno de Internacia Kosmonaŭtika Federacio
41-NET-273	Okt.09	La pejzaĝoj de la urboj
42-NET-274	Okt.22	La 60-a datreveno de la venko de la longa marŝo de ĉina Ruĝa Armeo
43-NET-275	Nov.05	La popola kolora modlo de Tianjin
44-NET-276	Dec.19	La ekonomiaj konstruoj de Hongkong
1997-01-NET-277	Jan.01	La ĉina unua generala esploro de agrikulturo
02-NET-278	Jan.01	La ĉina turisma jaro 1997
03-NET-279	Jan.05	La Bova Jaro 1997
04-NET-280	Jan.22	La 6-a jaro de sukcesa lanĉo de sond-raketo VEGO III en Danzhou de Hainan

Ĉiuj stampoj estis uzataj en Haikou sur la Hainan-insulo, escepte de 1997-04, kiu estis uzita en Danzhou.

1997- 05-ET 153	Mar.07	(presita verda apudstampo) Memore al samideanino Verda Majo

stampo de Verda Majo 1997-05-153 sur TUT'aĵo. Priskribon vd. tie.

LVL 05 - ET 153





VERDA MAJO - mallonga biografio

"Verda Majo" (Hasegawa Teru, * 1912-03-07 - + 1947 01 10) estis fama japana esperantistino, internaciista batalantino kaj pioniro de la japana-ĉina amikeco. Ŝi naskiĝis en la vilaĝo SARUHASHI (Japanio). En 1936 ŝi edziniĝis kun la esperantisto LIU REN (* 1909 09 13 - + 1947 04 22), kiu dum tiu tempo studis en Japanio

La 19an de aprilo 1937 ŝi venis al Ĉinio, kune batalis kun la ĉina popolo en la rezistmilito kontraŭ Japanio kaj multe kontribuis al la progresema idealo de la homaro. Por memorigi ŝin oni starigis monumenton kaj maŭzoleon "Verda Majo kaj Liu Ren" en la urbo JIAMUSI en nordorienta Ĉinio. 1982 aperis en la Ĉina-Esperanto-Eldonejo la libro *"Verkoj de Verda Majo"* kun ŝiaj verkoj kaj tradukoj en Esperanto. Por memorigi ŝin aperis multaj literaturaĵoj kaj memoraĵoj. Inter alie la televida filmo *"La stelo sopiranta hejmlandon"* al kiu *DENG XIAOPING* aŭtografis la titolon (li estis prezidento de PR Ĉinio).

BPK de la geedza paro VERDA MAJO kaj LIU REN (eldonita de E-sekcio de CENTRO DE ĈINAJ ELDONEJOJ)



Eterne floru la amikeco inter esperantistoj kaj popoloj de Ĉinio kaj Japanio!
中日世界语者、中日人民友好万古长青!





Verda Majo kaj Liu Ren ĉe sia geedziĝo

En la televida filmo "Hejmosopira Stelo" japana aktorino Kurihara Komaki kaj ĉina aktoro Gao Fei ludas la geheroojn Verda Majo kaj ŝia edzo Liu Ren respektive.




UNUAJ E-STAMPOJ EL KROATIO

Stampo: "110 jaroj Esperanto" el Rijeka

La stampo havas la supran tekston en Esperanto kaj en la kroata lingvo kun la dato: 3 5 1997 kaj troviĝas sur dekora memorkoverto de la Filatela Klubo en Rijeka. La koverta teksto povas esti miskomprenata. Ne temas pri tio, ke jam depost 110 jaroj ekzistas Esperanto(-movado) en Rijeka, sed, ke la tieaj ge-esperantistoj festis la 110 jarojn de ekzisto de Esperanto.


daŭrigo: "110 jaroj Esperanto"...

KROATIO



Dankon al la tieaj gesamideanoj pro ilia filatela aktiveco. Koran dankon ankaŭ al Elda DÖRFLER, kiu afablis informi nin per kopio kaj teksto pri ĝi. Ni esperu, ricevi orginalan stampon.

STAMPO: "UNUA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ" EN ZAGREB



daŭrigo: UNUA KROATA KONGRESO ...

Temas pri la unuataga stampo por la kroata E-pm, surpresita sur FDC-dekor-koverto kun la dato: 31. 5. 1997 . La teksto en ĝi estas en la kroata lingvo. Meze de la stampo videblas la kongresa emblemo.

Pri tiu nova UTK kun E-pm kaj E-stampo mi ricevis informojn de nia estimata s-ino Elda Dörfler kaj mi dankas.

Samtempa stampo el Slavonski Brod ??

S-ino Spomenka Stimec skribis en UEA-revuo "esperanto", julio 1997, pri samtage uzita stampo omaĝe al tiu kongreso lige kun speciala koverto. Bedaŭrinde mankas informoj pri ĝi. Kiu scias detalojn pri tiu koverto kun speciala stampo?



STAMPO "ALP - ADRIO 9-A ESPERANTO - KONFERENCO"

Ankaŭ pri ĝi mi nur eksciis dank'al la afableco de nia Elda DÖRFLER. kiu bonvolis sendi informojn pri tiu stampo. Uzita ĝi estis la 7.6.1997 en CRIKVENCIA por la supre menciita E-Konferenco. Bedaŭrinde la poŝtistino ne sukcesis legeble apliki tiun stampon sur la poŝtkartoj. Meze en la stampo videblas la emblemo de la ALP-ADRIO konferenco. Plej koran dankon al nia Elda Dörfler.

SLOVAKIO

IFEF - STAMPO EL KOŜICE (SLOVAKIO)

Nia Anton Straif informis fine de majo pri tiu stampo. Per ĝi malfermiĝas ankaŭ nova landa rubriko en nia katalogo de E-stampoj. Jam 1948 funkciis poŝta stampilo por la 2a Slovaka E-Kongreso. Siatempe Slovakio estis parto de Ĉeĥoslovakio.

daŭrigo: slovaka stampo



Nun oni uzis la stampon por la *49a IFEF-KONGRESO*, kiu okazis en KOŠICE de 10. - 17. 5. 1997.
La stampo nur funkciis unu tagon: 16. 5. 1997

La teksto estas en Esperanto kaj en la slovaka lingvo. Vidu la apudan kopion.

Koran dankon al Anton STRAIF (A).

RESPUBLIKO KROATIO (HVARTSKA) ELDONIS PM

Mezuro: 39,76 x 35,50 mm
Kombila dentumo: 14
Bildo: portreto de d-ro Zamenhof, verda stelo
Eldonkvanto: 350 000 ekzempleroj
Aŭtoro: Eugen Kokot, artpentristo
Folio kun 20 pm (4x5)
Eldonis: Kroata Poŝto kaj Telekomunikado, Zagreb (Kroatio) (HPT)

papero: blanka, gumita
preso: plurkolora ofseta
eldontago: 31a de majo 1997
Valoro: 1,20 kuanoj
Oficiala UTK (FDC)

Priskribo: Maldekstre portreto de d-ro Zamenhof, dekstre verda stelo kun ĉielarka vosto, sub ĝi la nominalo: 1,20 kunaoj

Tekstoj supre en la kroata lingvo kaj en Esperanto:
UNUA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

Maldekstre supre apud Zamenhof la kongresa simbolo

Dekstra marĝeno: REPUBLIKA HRVATSKA (Respubliko Kroatio)
Maldekstra marĝeno (preskaŭ ne legebla): "AKD - HTZ 1997 =
presejo kaj eldonjaro
KOKOT (la desegnisto)

Folio-priskribo: 4 pm horizontale kaj 5 vertikale

Sur la dekstra kaj maldekstra foliorandoj:
UNUA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ
Supre kaj sube la sama teksto kroatlingve
En ĉiuj kvar anguloj de folio: la kongresa emblemo

Priskribo de UTK (FDC): koverto kun la pm kaj surpresita stampo (priskribo kaj bildo de koverto vidu sub:STAMPOJ). Supre maldekstre: simbolo de HPT kun poŝtkorno.
Bildo: Zamenhofa portreto kun verda stelo kaj teksto:
KROATIO - UNUA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ
Maldekstre: FDC-HPT 7/97 kaj sub la bildo: REPUBLIKA HRVATSKA

Por propagandi la E-PM la Kroata Poŝto disvastigis koloran prospekton en 4 lingvoj. En ĝi troviĝas pluraj malglataĵoj. La tradukisto de la kroata teksto lokigis Ukrainion al Belgio aŭ notas FUJEIRA inter la landoj, kiuj eldonis E-pm (Fujeira planis eldoni pm-blokon, sed ne sukcesis. La bloko estas registrita sub: Krome ekzistas...). Tiaj malglataĵoj troviĝas en la malgrande presitaj tekstoj, kiujn kutime apenaŭ legas filatelistoj.... Tamen, tiuj tekstoj estas tre legindaj, ankaŭ

daŭrigo: kroata pm..

la teksto, verkita de Spomenka Stimec, nia kara kaj altestimata samideanino en tiu lando.

Suprajn informojn mi povis verki pro ricevitaj filatelaj materialoj kaj koloraj kopioj, kiujn bonvolis sendi al mi nia Elda DÖRFLER. Do, koran dankon al ŝi.


























TUTAJOJ

PRI NOVAJ ĈINAJ TUT-PK KUN PRIVATA ALPRESO

De Ĉinio ekzistas nur unu "poŝtoficiala E-TUT": la TUT-koverto de la 71a UK en Pekino. La nunaj ĉinaj E-TUT estas normalaj PK kun privata E-alpreso. Jam en aliaj landoj aperis tiu speco de PK/KO, ekz.: GDR, Pollando, Bulgario kaj Austrio. Ni ne forgesu la nur nun elkovritan TUT-PK, eldonita 1932 okaze de la 21a Germana Kongreso en Chemnitz. Eblas plilongigi tiun liston. Nepre mi atentas, ke tiuj TUT kun privataj alpresoj, almenaŭ la malnovaj, atingas sufiĉe altajn prezojn en la ofertoj de aŭkciaj firmaoj. Sed tio ne havas signifon por "oficialeco",tiaj TUT restas "oficialaj TUT kun privataj alpresoj".Ekzistas kolektantoj, kiuj volonte akceptas tiujn TUT por iliaj kolektoj. Ankaŭ ekzistas filatelistoj, kiuj kategorie neas la enmeton en kolektojn.

Mi kiel redaktoro troviĝas en la plej malfeliĉa pozicio, ĉar mi devas transdoni ricevitajn informojn kaj akcepti kritikojn, se foje iuj informoj estas eraraj laŭ konvinko de la kritikanto(j).

Rimarko de la katalog-eldonanto: Se tiuspecaj TUT estas katalogitaj en la grandaj TUT-katalogoj, kiel "Michel", "Borek" aŭ la aŭstra katalogo kaj manlibro de Schneiderbauer, tiam oni povas kolekti tiujn TUT sen skrupuloj.

De la ĉina TUT-PK "Tao Xingzhi, 15-fena, nun aperis la 4a eldono kun pli granda stampo.

La eldonkvanto por la TUT-PK "La Unua Amo Por Ĉiam" estas 12 000 ekzempleroj.

Atentigo pri la poŝtaj tarifoj en Ĉinio: la 1an de decembro 1996 ili altiĝis de 10 fenoj al 40 fenoj por enurba tarifo kaj de 15 fenoj al 40 fenoj por eksterurba tarifo. La tarifo por sendaĵoj al eksterlando altiĝis duoble kaj pli. 1987 kostis letero al Germanio 80 fenoj kaj 1997 venis letero kun afranko de 14,40 juanoj.

TUT-PK "Verda Majo" (bildo vd. sub stampoj)

Por memorigi la 50-an datrevenon de la forpaso de Verda Majo kaj por kontribui al la solenaĵoj por la 25-a datreveno de la normaligo de la diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio, oni aperigis tiun ĉi TUT-PK. Realigis ĝin:

Pekina Poŝta Administracio
Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj
Societo "Amikoj por Esperanto"
Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), Pekina E-Asocio,
Chongqinga E-Asocio, E-Asocio sub ĉina
Akademio de Sciencoj

La titolon de la memorkarto surskribis (aŭtografis)samideano CHEN HAOSU, vicprezidanto de la Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj vicprezidanto de ĈEL kaj de la Pekina E-asocio.

La aŭtografo de CHEN HAOSU en ideogramoj supre maldekstre:

"Memore al la samideanino Verda Majo, fama japana esperantistino, internaciisma batalantino, antaŭirantino de ĉina-japana amikeco"

daŭrigo: TUT-PK "Verda Majo"

La maldekstra bildo montras la portretojn de Verda Majo kaj Liu Ren kun iliaj vivodatoj, E-stelon inter du koroj kun la geedziĝa jaro 1936. La tuto estas ĉirkaŭita per prunfloroj, sakuroj kaj pinofingroj.


Desegnis: Tan Ailing kaj Xie Shaoxing.

La surpresaĵojn oni faris sur TUT-PK de 1993, 10 kaj 15 fenaj.

Resumita el informo de la Filatela Societo de Pekina E-Asocio.

TUT-PK ** 29-a IFEF-Kongreso en Kosice (Slovakio)

Nia estimata kluba amiko Anton STRAIF fine de majo sendis tiun filatelaĵon. Temas pri poŝtkarto kun surpresita pm de 2 slovakaj kronoj (SK). Algluita estas pm de 1 krono. Maldekstre estas alpresita teksto pri la 49-a kongreso de IFEF (en slovaka lingvo) kun bildoj de trajno, IFEF-blazono kaj urba silueto en la koloroj verda kaj nigra.



Verŝajne temas pri TUT-PK kun privata alpreso. La PK estas stampita per la E-poŝta stampo.

Mi esperas, ke la IFEF-amikoj en nia ELF-AREK ankoraŭ povas sendi detalajn informojn pri tiu TUT-PK. Jam nun koran dankon al nia kara Anton STRAIF pro la sendita informo.

GLUMARKOJ

Portugalaj "artmarkoj" de 1919

Nia estimata Mia MAATMAN sendis al mi originalan kajeron kun la "Esperantaj artmarkoj de Portugalio el la jaro 1919. Ŝi trovis ilin en la postlasaĵo de sia patro, post la Dua Mondmilito. Tio estis malgranda miraklo, ĉar preskaŭ ĉiuj Esperantaĵoj dum la germana okupacio de Nederlando estis konfiskitaj, bruligitaj...
La glumarkoj ekzistas en multaj kolor-variaĵoj kaj montras portugalajn vidindaĵojn:

FENESTRO DE LA KRISTA MONAĤEJO - TOMAR
"Lernu vian nacian lingvo kaj Esperanton"

JERONYMOS - LISBOA
"Konstante frapante ne celas, ni trafas"

MONUMENTO DE BATALHA - BATALHA
"Per Esperanto ni interfratiĝas"

PREĜEJO DE SANKTA MARIO - ALCOBACA
"Esperantismo estas pacigafero"

NEKOMPLETA KOLONO - BATALHA
"Ni volas la pacon, mi lernos Esperanton"

TURO DE BELEM - LISBOA
"Ni semis, ni semas, ni semos"

PALACO DE QUELUZ - QUELUZ
"Laŭ la mastraj deziroj iras antaŭen la Portugaloj"

PLACO DE LA KOMERCO - LISBOA
"Esperanto trafas la feliĉecon"

La glumark-kajero estis forsendita la 25a de aŭgusto 1919 de s-ro Saldanha Carreira en Lisboa. Li ankaŭ verkis artikolon por la *Enciklopedio de Esperanto* pri la Esperanto-Movado en Portugalio. Li, per dekreto de la militministro, estis la unua oficiro en la mondo, kiu rajtis porti E-insignon sur sia uniformo.

<u>Rimarko de katalog-eldonanto:</u> Tiuj ne katalogitaj glumarkoj, sen dato, aperis 1921 sub la katalog-numero 101 kun la surpreso: *1. Feira de Lisboa (Portaria no. 2585).* Tiu foiro pro diversaj kaŭzoj ne okazis. La eldoninto de tiuj glumarkoj, s-ro Carreira, estis ĝenerala sekretario de tiu foiro. La surpreso signifas: *Permeso por senpaga afranko numero 2585.* La surpreso estis en diversaj koloroj. Estis surpresitaj ĉiuj ankoraŭ ekzistantaj folioj, sed la plej multaj perdiĝis.



la ne katalogita glm
de 1919

la surpresita glm
no: 101 kun surpreso



daŭrigo: glumarkoj

La Esperantaj "HIPPIE-GLUMARKOJ (Hippie = florinfanoj)

Multaj el ni ankoraŭ mem travivis tiun "Hippie"- epokon. Ateston pri ĝi ni ankaŭ trovas inter niaj E-glm. Aperis de la "Internacia Krim-Sindikato" en 1969 30 diversaj glumarkoj kun iuj stultaj E-tekstoj. Mirigas, ke siatempe tute seriozaj E-istoj, kiel niaj pioniroj: Franz Meyer kaj R. Jensen aŭ ankaŭ la E-muzeo en Wien (A) okupiĝis pri ili. Krome pri la "Kanguru-epoka" - insigno "Venu al la verda venk'!" Fonto de tiuj E-aĵoj estis E-rondeto ĉe la universitato de Ĉikago . Oni vendis tiujn objektojn, absolute malklare...kial mi skribas pri tio: nun mi donace ricevis parton el ili kaj kompreneble iujn mi prezentas al vi fotokopie. Pri tiuj markoj jam artikolis nia informilo "FENIKSO" - n-ro 12 (1.11.1970).

Rimarko de la katalog-eldonanto: Mi ne katalogos tiujn frenezaĵojn kiel glumarkoj. Sufiĉas la publikigado en nia LVL.

Protestu lon! Skribu al la Estraro	Ludoviko Savas	
Lenadolsöd Volapüki	Pensu Verde!	Vizitu Volapükujon
UNO ESTAS PAPERTIGRO! ĈE ESTAS PAPERKANONO!	ĈU VI PAROLAS LA KROKODILAN ?	DEK JAROJ DE LA MEMORLIBRO 1959-1969
EĜEĜOJ	La rasa problemo finiĝus, se ĉiuj popoloj verdiĝus	TRINKU ESPERANTON
Made in Esperantujo	© 1969 Internacia Krim-Sindikato	Kristiano K Sabina geverdas = Ludoviko savas !

daŭrigo: glumarkoj

SVEDAJ GLUMARKOJ EL LA KOMPUTILO

Kvankam s-ino Hilgon FRISK ne plu estas membro de nia klubo, ŝi afable sendis leteron al mi kun informoj pri novaj E-glumarkoj. Faris ilin per komputilo s-ano Karl-Gustaf GUSTAFSON. Helpis al li per konsiloj lokaj klubanoj.

Temas pri 8 diversaj glm, kiuj informas Svedojn pri eventoj/faktoj de la sveda Esperantujo.



Finns på nätet
Besök Svenska EsperantoFörbundets hemsida så får du veta mer om språket som är lättare att lära än andra språk.
http://www.esperanto.se

1 Vizitu Svedan E-federacion
Hejmpaĝo: http://www.esperanto.se
(kun bildo de E-glm kaj sveda teksto



CENTRUM för Esperantoaktivitet och rekreation
hela året
ESPERANTOGÅRDEN ☎ 0590-30909
Lesjöfors STF VANDRARHEM

3 Esperanto-domo LESJÖFORS kun migranta hejmo (tutjara tranoktejo)
(kun bildo de la domo kaj sveda teksto)




ESPERANTO
1887 - 1997
För språklig demokrati vid internationella kontakter

5 Esperanto 1887 - 1997
(kun bildo de Esperanta- kaj sveda flagoj)



Årets SEF kongress
17-19 maj
1997
ESPERANTOGÅRDEN
Lesjöfors


7 SVEDA ESPERANTO-KONGRESO
17 - 19 MAJO 1997 en LESJÖFORS
(bildo: ESPERANTOGARDEN)



Förlaget
Al-fab-et-o
Ger ut böcker på
ESPERANTO
☎ +46 500 485546

2 Eldonejo Al-fab-et-o
(kun bildo pri faboplanto kaj sveda teksto)

Skövde Esperantoklubb



Grundad 1932

4 SKÖVDE - Esperanto - klubo
(Fondita 1932)
(kun bildo: manpremo)



1887 - 1997
Vänskap över gränser
Amikeco trans limoj

6 AMIKECO TRANS LA LIMOJ
1887 - 1997
(kun bildo: Esperanto kun stelo kaj manpremo)



ESPERANTOGÅRDEN
Lesjöfors
Karlskoga Folkhögskola ordnar i samarbete med Esperantogården
SOMMARKURS
8-20 juni
1997

8 SOMERA KURSO 8-20 JUNIO 97 en LESJÖFORS (bildo:E-GARDEN)

daŭrigo: glumarkoj

2-a HANSA ESPERANTO-TAGO EN STRALSUND (D) 1997.05.1a - 4a

70 x 31, memglua, nigra sur blanka, komputile printita de SHELO. Tiu E-Tago estis planita por MIELNO (PL), sed tiu plano estis nuligita.





1-A KROATA KONGRESO 31.5.-1.6.1997 EN ZAGREB



Jen la unua E-glumarko el la nova ŝtat: Kroatio. La informon pri ĝi ni dankas al nia estimata s-ino Elda DÖRFLER.

La ovala centra simbolo ŝajne havas grafikan signifon pri nia nova E-simbolo, ovala terglobo. Pri la internaj romboj ne ekzistas klareco. Ŝajne ili estas parencaj al la romboj en la blazono de Kroatio.
La teksto en la glumarko:

UNUA KONGRESO DE LA KROATAJ ESPERANTISTOJ

en Esperanto kaj en la kroata lingvo

La dua glumarko de Kroatio aperis okaze de la:



9-A ALP - ADRIO ESPERANTO - KONFERENCO

Tiu okazis en CRIKVENICA-KROATIO, 5-8 junio sub la temo: NATURO KAJ VIVTREZOREJO,

Memglua kun la koloroj blua/nigra sur blanka papero. La informon pri ĝi ni ankaŭ devas danki al nia Elda DÖRFLER.

Atentu la poŝtan E-stampon de tiu konferenco.

Aperis pliaj novaj glumarkoj, ekzemple okaze de la 90-jara ekzisto de la E-grupo en Chemnitz. Temas pri folio kun diversaspektaj 21 glumarkoj. Sur plia samtema glumarko videblas la portreto de Karl Marx, ĉar la urbo por certa tempo portis la nomon: Karl-Marx-Stadt.

Pliaj informoj kaj bildoj sekvos en la venonta LVL.

LASTMINUTE...

7º INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO
56-a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO
VALENCIA 11 JULIO 1997



RICHARD HIRSCH
LAMBERTSTRASSE 12
36251 BAD-HERSFELD
ALEMANIA

... atingis min tiu hispana stampo, uzita okaze de la 56-a Hispana Esperanto-Kongreso 1997. Pri kiu 7a Internacia Kongreso temas? Mi afable petas niajn hispanajn kolektamikojn pri informo. Dankon! Krome mi konstatis, ke la dana poŝto ankaŭ 1997 uzas la varbstampon de 1996 en diversaj urboj, sed mankas la informoj kie kaj kiam?

Informilo de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista * Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj)
Offizelles Organ der ArGe Esperanto (laborgrupo Esperanto de la germana VdPhA= Asocio de la germanaj Filatelaj Laborgrupoj)

Redaktoro: Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62, DE-09123 CHEMNITZ

Prezidanto: Hermann Heiss, Lohstr. 48, DE-77704 OBERKIRCH

Kasisto: Rolf Beau, Saxoniastr. 35, DE-04451 ALTHEN

Bankoj: Sparkasse Leipzig — Konto-No: 1 190 223 208, Bankkodo (BLZ): 860 555 92

Postbank Nürnberg: Konto-No: 036 6737-855, Bankkodo (BLZ): 760 100 85

UEA-konto: elfx-r

Kotizoj 1997: okcidentanoj: DM 30,--
orientanoj: DM 20,--

Stampobanko: Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, DE-29614 SOLTAU

Kompostis, presis kaj ekspedis: Richard Hirsch, Lambertstr. 12
(katalog-eldonanto) DE-36251 BAD HERSFELD